

## Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2021

Jarkolekto 8 - Numero 4



*Neustadt êe Orla: 700 jaroj. Sceno kun preganta medalisto. Brakteato 1987 / 40 mm.*

*Medalo de Jānis Strupulis. Pregbalancilo. 1998 / 45 mm*

# ENHAVOTABELO

de oktobro 2021

Titolpaĝo: <i>Neustadt ĉe Orla: 700 jaroj. Sceno kun preganta medalisto. Brakteato 1987 / 40 mm</i>	1
<i>Medalo de Jānis Strupulis. Pregbalancilo. 1998 / 45 mm</i>	
Enhavotabelo .....	2
De ni por ... ni! .....	3
Moneroj & medaloj .....	5
Kvina Universala Kongreso 1909 en Barcelono	
Esperanto-tenis-turniro 1912	
Jules Verne (1928-1905)	
Sepa Universala Kongreso 1911 en Antverpeno	
Latvia poeto Nikolajs Kurzēns (1910-1959)	
Spikumaĵoj & suplementoj: Roman Jaroslavoviĉ Ĉajkovskij (°1962)..	14
Por spuremuloj: COOPERATIVA LA LIBERA POPOLO.....	15
Aspektoj de numismatiko: Brakteatoj.....	16
Valormarkoj & valorbiletoj: Atestilo de la Esperanto-Centro de Herzberg .....	17
Medalisto: 27 Franz Xaver Pawlik (1865-1906) .....	18
Historiaj aspektoj: Julio Mangada Rosenörn (1877-1946) 2.....	19
Numismatika Forumo: Kriptomono Esperanto .....	23
Terminaro: Alfabeto listo (27) .....	25
El la gazetaro: René de Saussure .....	26
Retpoŝto .....	27
Anoncoj & eventoj .....	33

**Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)**

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts  
Provlegado: Jozefo Horvath  
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!  
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be  
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>  
[www.esperanto.es/biblioteko](http://www.esperanto.es/biblioteko)  
[www.kolektado.esperanto.cc](http://www.kolektado.esperanto.cc)

## *DE NI POR ... NI!*

**Kia mondo respeguliĝas en medaloj!  
Renato Corsetti (07.07.2021)**

Jen la lasta numero de “Esperanta Numismatiko” de la oka jarkolekto. Ankoraŭ unu jaro kaj sekve okazos la 10-jara jubileo de nia revuo en 2023!

Vi ricevas ankaŭ ĉi kvaran numeron de 2021 kun la kutima peto reagi iel. Estas agrable por nia asocio konstati, ke abonanto konfirmas la ricevon de nova revuo. Krome plaĉas al la redakcio ĉiu reago pri iu ajn aspekto de la revuo. Nur tiel eblas altigi la deziratan kvaliton!

Okaze de la sendo de la antaŭa, tria numero, ENA ricevis tre interesan reagon el Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof en Pollando, ĉar la redakcio ankaŭ regule sendas la fakgrupan organon al la “Forumo Zamenhof”, kiu troviĝas en la sama konstruaĵo kiel la urba asocio “Bjalistoka Esperanto-Societo”. Tiu organizo prizorgas en la persono de Maria Niemyjska la Esperanto-Libraron, kiu estas filio de la Podlaĥia Biblioteko.

Nu, post la ricevo de la tria numero ĉi-jara, Maria sendis tre agrablan mesaĝon kun la novaĵo, ke ŝi meminciate (!) “dissendis la revuon al personoj, kiuj estas ligitaj kun Esperanto en Bjalistoko kaj en la podlaĥia regiono. **Tio estas 82 retadresoĵ**”!



La Bjalistoka Esperanto-Societo organizas renkontiĝojn ĉe la monumento de Zamenhof en Bjalistoko okaze de la datrevenoj de liaj naskiĝo kaj morto

Ni evidente tutkore dankas Marian kaj gratulas kaj bonvenigas ŝin kiel novan bibliotekistinon de la loka Esperanto-Libraro.

**Kiu el niaj karaj abonantoj kaj legantoj sukcesos per sendo de klarigo pri nia nova numero varbi plian membron, individuan aŭ asocian, por ENA? Nur dufoje du ankoraŭ mankas por atingi respektive la novajn mejlŝtonetojn de 150 individuaj kaj 25 asociaj membroj!** La redakcio tutkore antaŭdankas ĉiun, kiu (sukcese aŭ ne) provos varbi almenaŭ unu novan membron!

Bert





Generalo H. Sebert kun Zamenhof en Barcelono, ambaŭ surhavantaj la UK-medalon 1909



Kongresa karto de belga esperantisto



Novarta afiŝo de la barcelona Universala Kongreso



# MONEROJ & MEDALOJ

## Tipo A2 - Esperantaj medaloj

Kvina Universala Kongreso 1909 en Barcelono



Lando: Katalunio (Hispanio)

Metalo: arĝento (arĝentita?)

Mezuroj: 48 mm x 40 mm (ovala)

Jaro: 1909

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 7,58 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2 mm

### ***Averso:***

ĉirkaŭe, sube: unu rozo kun ambaŭflanke folieto, el kiuj suprengrimpas rozbranĉetoj kun dornetoj. El ili kreskas ses aliaj folietoj kaj tri rozoj

supre, meze: verda, emajlita steleto

sube: korforma, libere interpretita urba blazono de Barcelono kun surtekstoj:



= 5a – 11a de septembro 1909



= Internacia 5a Kongreso



### ***Reverso:***

Spegula bildo de la averso, iom konkava, per la tekniko de brakateoj, fiksebla sur robo kaj roverso per aldone fiksita fibolo

### ***Rimarko 1:***

La oficiala urba blazono de Barcelono



### ***Rimarko 2:***


Ambaŭ flankoj havas la saman “koloron”. Tio povus esti signo, ke la medalo ne estas arĝentita, sed arĝenta

### ***Rimarko 3:***

La UK-medalo de Barcelono estas historie la dua en la vico . De la unuaj tri kongresoj (1905, 1906, 1907) ne estas konataj numismatikaj memoraĵoj. La plej olda, do probable la unua UK-medalo, estas tiu de 1908 el Dresdeno, **priskribota en la venonta numero de nia revuo.**

## Tipo A 2 – Esperantaj medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

### Esperanto-tenis-turniro 1912



Lando: Britio(?)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: orita (?)

Pezo: 13,8 g

Mezuroj: 38,1 x 38,1 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1912

Diko: 1,75 mm

#### ***Averso:***

ornamita rando ĉirkaŭ kvadrata medalo en romba pozicio

supre: verda Esperanto-stelo, du antikvaj tenisrakedoj krucitaj. Sub la rakedoj tri tenispilkoj

meze: surskribo: “II. ESPERANTO – TENNIS – TOURNIER

29. SEPT. 1912”

gravurita cifero “1” en ornamita trabeto

sube: la vorto

“KLASSE”

### ***Reverso:***

surskribo: "MIXED DOUBLE"

"I.PREIS"

### ***Rimarko 1:***

1 KLASSE = unua klaso; ĉu la plej alta nivelo nur ĉe la tenisklubo aŭ oficiale (?)

### ***Rimarko 2:***

metalo: aspektas kiel oro. Se orita: ĉu per la tekniko de orplakado, ĉu per tiu de rulpremado?

### ***Rimarko 3:***


MIXED DOUBLE (angla termino) = miksa duopo > ĉiu teamo konsistas el unu virino kaj unu viro

### ***Rimarko 4:***

la turniro kaj la enmanigo de la medalo(j) okazis en 1912, la jaro de la 25-jara jubileo de Esperanto, do en la jaro de la eldono de la ikonaj spesmilo-pagmedaloj, fabrikitaj de la firmao Holy Frères el Svislando

### ***Rimarko 5:***

I.PREIS: ĉu nomo de unu el la gajninta miksa duopo? Ĉu medalo kun la nomo de la dua?



***En la nomo de la redakcio mi tutkore dankas nian ENA-membron James Rezende Piton el Brazilo pro la meminciata sendo de la fotoj kaj informoj pri ĉi ne-ordinara medalo!***



## Tipo B1 – Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Jules Verne (1928-1905)



Lando: Francio

Metalo: *serĉata* (orkolora)

Diametro: 34 mm

Jaro: 1984

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 13,70 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2 mm (krenela)

### ***Averso:***

meze: stiligita portreto de Jules Verne per rimarkebla, strieca stilo.

ĉirkaŭe: abstraktaj dekoraĵoj surbaze de la sama stilo.

### ***Reverso:***

meze: en neordinara stilo formoj kaj ilustraĵoj kiel averse.

tute meze: parto de urba kvartalo. Probable la kvartalo kie troviĝas la muzeo Jules Verne en la franca urbo Nantes.

ĉirkaŭe en rubandeto: “Musée Jules Verne Nantes”

### ***Rimarko 1:***



la franca verkisto Jules Verne, ido de la romantika 19a jarcento, estas tutmonde fama kiel aŭtoro de aventurromanoj kiel “*Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*” kaj li estas konsiderata kiel la patro de la moderna sciencfikcio, i.a. per liaj romanoj “*Dudek mil leŭgoj sub la maroj*” kaj “*De Tero al Luno*”.

Kiam Jules konatiĝis kun Esperanto, li tuj komprenis, ke la ŝlosilo de la

interhoma komunikado estu forĝata per la internacia lingvo. Al tiu temo li planis dediĉi libron. Li ekredaktis la romanon “*Esplorvojaĝo*”, en kiu Esperanto estus ludonta elstaran rolon kiel lingvo parolata en Afriko. Lia forpaso malebligis al li finredakti ĝin. Lia filo Michel daŭrigis la redaktadon, sed bedaŭrinde forigis ĉiujn aludojn al Esperanto. Bona ŝanco estis tiel perdita!


La pranevino de Verne atestis pri lia favoro al Esperanto kaj eĉ Zamenhof mem en letero al Carlo Bourlet de 1904 menciis lin kiel subtenanton de Esperanto.

Jules Verne fariĝis honora Prezidanto de la Esperanto-grupo de la franca urbo Amiens, kie li tiam loĝis.

**Rimarko 2:**

tiu numismatikaĵo ne vere estas medalo, sed muzea ĵetono, eble havebla pere de aŭtomato.

**Rimarko 3:**



**Rimarko 4:**



## Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

Sepa Universala Kongreso 1911 en Antverpeno



Lando: Belgio

Kvanto: serĉata

Metalo: *serĉata* (orkolora)

Pezo: 1,80 g


Diametro: 21 mm

Medalisto: ĉe Glaser & Sohn (Dresden)

Jaro: 1911

Diko: 1 mm

***Averso:*** (unuflanka)

verda steleto kun orkolora rando (kiel la reversa flanko). Kovrita de verda, brila emajlo. Nur unu surskribo en ora kolora . **Ĝis nun la plej minimaleca surskribo sur esperanta medalo!**



### **Reverso:**

nur stampo de la dresdena firmao “Glaser & Sohn” (Glaser kaj Filo), apenaŭ legebla. La stampo mem ne estas parto de la temo, sed pruvo de la fabrikado de la medaleto far la germana firmao.

### **Rimarko 1:**

en jarkolekto 5, n-ro 3, p. 4 ni jam priskribis alian medalon (el 1912) okaze de la 25-jara jubileo de Esperanto, kiu havas dorse multe pli klaran stampon de la sama firmao. Al ties kompetento la komisiintoj de 1912 post la 7a de Antverpeno ŝajne forte fidis!



### **Rimarko 2:**

la rubandeto kun pinglo, por ebligi surhavon (i.a. dum la UK), montras la tri kolorojn de la belga nacia flago (ekde 1830).

### **Rimarko 3:**

okaze de la sepa Universala Kongreso en Antverpeno estis eldonitaj ankaŭ tri glumarkoj kaj abunda serio de poŝtkartoj.





## Tipo D1 – Unuflankaj esperantaj medaloj

Latvia poeto Nikolajs Kurzēns (1910-1959)



Lando: Latvio

Kvanto: *serĉata*

Substancoj: bronzo aŭ argilo

Pezo: *serĉata*

Diametro: 75 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1984

Diko: *serĉata*

**Averso:** (unuflanka medalo):

ĉirkaŭe: “ESPERANTO POETO NIKOLAJS KURZĒNS 1910-1959”

meze: busto tute dekstren

**Rimarko 1:**

Kurzēns estis ŝtata oficisto kaj unu el la plej talentaj originalaj poetoj de la lingvo Esperanto. Krome li estis redaktoro de la dua Esperanto-revuo latvia “Ondo de Daugava” (1925-1935).

**Rimarko 2:**

la latvia medalisto Jānis Strupulis kreis ne nur medalon omaĝe al Kurzēns, sed ankaŭ duflankan medalon omaĝe al alia redaktoro de “Ondo de Daugava”: Augusts Kazoks.



(vidu jk.7 n-ro 3)

# *SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ*

## **Roman Jaroslavoviĉ Ĉajkovskij (°1962)**



Roman naskiĝis la 20an de junio 1962, en Borislav (Ukrainio), urbo en la regiono Lviv. Li finstudis en la Ukraina Akademio de Arto en 1992. Postlernada Studo UAM (1995) ĉe fakuloj kaj profesoroj, kiel V. Borisenko, V. Borodaj kaj V.Ŝvecov. Membro de Nacia Unio de Artistoj en Ukrainio.

Kiel skulptisto kaj medalisto li kreis diversajn famajn verkojn, kiel:



- moneron "Nacia Muzika Akademio de Ukainio" (2013),
- skulptaĵon "Kometo Halo" (1998),
- medalon "Anna Jaroslavna" (1999),
- moneron "Kristnasko" (2000),
- skulptaĵon "Themis" (2001),
- skulptaĵon "Nova Vergilio" (1997),



Esperanta medalo de Ĉajkovskij priskribita en jarkolekto 6, n-ro 1, p. 13

Rubriko "Medalistoj": jam parte priskribita en jarkolekto 6, n-ro 2, p. 11

*Ni elkore dankas nian ukrainian membron, Tatianan Mihnon, pro la informoj pri la medalisto.*

## POR SPUREMULOJ!

### COOPERATIVA LA LIBERA POPOLO

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ malmulte aŭ preskaŭ nenion. **Helpu ENA-n!**

#### 23a enigmo



Jen ĵetono el la kataluna urbo Anglés, kiu estas priskribita en la broŝuro “Esperanto-mono”, kompilita kaj verkita en 2000 de nia karmemora honora membro Hans Jankowski.

Ĝi estas metala pagĵetono, **kies mezuroj al ni ne estas konataj.**


Averse, en la mezo troviĝas la urba nomo. Ĉirkaŭe la surskribo “ COOPERATIVA LA LIBERA POPOLO”. Sube, meze esperanta kvinpetala steleto.

Reverse nur la grandlitera hispana vorto “CENTIMOS”. Meze tre granda nombro **10**, flankata de sespintaj ne-esperantaj steletoj.

La nomo de la kooperativo sendube estas esperantlingva. Probable ĝi estis fondita de esperantisto(j) aŭ almenaŭ esperantisto(j), kiu(j) kunlaboris aŭ estis prunedoninto(j).

Laŭ Jankowski la pagilo probable estis uzata en la periodo 1920 – 1938. Pro ilustraĵo en lia broŝuro, ni scias, ke ekzistis ankaŭ specimeno kun la valoro “2 CENTIMOS”. Do eble aliaj!

Bibliografio: Hans Jankowski: “Esperanto-mono”, 2000<sup>2</sup>, p. 23



# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## Brakteatoj



Esperanta insigneca medalo unuflanka, brakteate pregita en 1954

### 1. Difino

Devenas el la latina “bractea” (= maldika metala disketo). Origine moneroj pregitaj per nur unu spegulbilda stampilo en ege maldikan metalan disketon. Tiel la reverso estas konkava spegulbildo de la averso. La medalo estis pregita reverse aversen.

La unuaj tipoj en la historio estis oraj medaloj uzataj kiel ornamaĵoj aŭ juveloj. Ĉefe pregataj en Nord-Eŭropo dum la popolmigrado en la germania ferepoko. Krome pregataj en la mezepokaj reĝlandoj ĉirkaŭ la Golfo de Bengalio, ekz. en la urbŝtatoj Harikela kaj Mon. La termino estas foje ankaŭ uzata i.a. por arĝentaj moneroj en Mezeŭropo, komence de la Mezepoko.

La lastaj regule pregataj brakteatoj estis t.n. “vojaĝaj brakteatoj”, reliefaj medalonoj, uzataj ĝis la fino de la 16a jarcento kiel pendaĵoj por pilgrimantoj. En kelkaj distriktoj de Svislando en la 18a jarcento estis produktataj brakteatecaj moneroj, t.n. “rapoj, heleroj kaj angsteroj”.

### 2. Kelkaj tipoj

A-brakteatoj: kun homa vizaĝo laŭ antikvaj imperiestraj moneroj.

B-brakteatoj: kun unu ĝis tri homaj figuroj, starantaj, sidantaj aŭ genuantaj, ofte akompanataj de bestoj.

C-brakteatoj: kun kapo de vireto super kvarpiedulo, probable la germania dio Vodano.

D-brakteatoj: kun unu aŭ pliaj ege stiligitaj bestoj.

E-brakteatoj: kun besto “Triskele” sub cirkula elemento.

F-brakteatoj: subgrupo de la D-brakteatoj kun fikcia besto.

M-brakteatoj: kun ambaŭflanke imitoj de romiaj imperiestraj medalonoj.





# VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

## Atestilo de la Esperanto-Centro de Herzberg (3)



Lando: Germanio

Kvanto: *serĉata*

Substanco: papero

Jaro: 1989

Mezuroj: 210 mm x 147 mm

Desegnisto: *serĉata*

### **Averso** (*unufanka briketo*)

ĉirkaŭe: punteca ornama kadro

supre maldekstre: blazono kun tekstoj: "Herzberg am Harz ... die Esperanto-Stadt (en la germana) / ... la Esperanto-urbo

supre meze: "Briketo – Baustein" (en la germana)

supre dekstre: alia blazono kun stelo kaj korforma desegno kun enskribo: "ICH Interkultura Centro Herzberg"

tute meze: ĉirkaŭ terglobo rondo de diversaj mondanoj

meze dekstre: "Valoro – Wert: 10,00 Euro" (post la strieto: germane)

sube: sama teksto en Esperanto kaj en la germana

tute sube: lokoj por la dato kaj por la subskriboj de la prezidantoj kaj de la kasistino

sub la kadro: informoj pri la institucio: adreso kaj retejo

## MEDALISTOJ

### 27. Franz Xaver Pawlik (1865-1906)



Pawlik estis aŭstria arta manlaboristo, stampofaristo kaj medalisto kaj eble, jam ne certe, la kreinto de la reversa urba pejzaĝo sur la sube montrata medalo el 1923.

Li naskiĝis en Vieno kiel filo de tajloro kaj komence eklernis gravuri, sekve desegni en klaso de Jozefo Grandauer kaj modli dank' al Rudolfo Weyr.



En 1886 Pawlik estis akceptita en la Akademio de Belartoj de Vieno, kie li estis lernanto de Jozefo Tautenhayn kaj Antonio Scharff. Studvojaĝoj montris al li la vojon al Germanio, Nederlando, Belgio kaj Italio. Ekde 1892 li laboris en la Viena Ĉefa Monfarejo kiel gravuristo-lernanto, ekde 1897 kiel helpgravuristo. Fine, en la periodo 1904-1906 li estis aktiva kiel moner- kaj medalgravuristo de la Viena Monfarejo.

Li skizis stampojn por moneroj, diversajojn, religiajn kaj premiajn medalojn kun figuraĵoj de la imperiestro Francisko Jozefo kaj ties parencoj kaj de multaj famuloj de la habsburga monarĥio.


Li ricevis multajn premiojn kaj distingojn, kaj en Aŭstrio kaj eksterlande.



averso



1909, sen informoj




reverso, eble laŭ kreaĵo de Pawlik (1923)

*Rimarko: la medalo estis montrita kaj priskribita en jarkolekto 1 numero 2 de "Esperanta Numismatiko"*

*La redakcio kore dankas d-ron Bernd Krause pro informoj kaj ilustraĵoj.*

## HISTORIAJ ASPEKTOJ

### Julio Mangada Rosenörn (1877-1946)<sup>2</sup>



La fama metala (?) plakedo honore al Mangada, bedaŭrinde malaperinta

#### B. Mangada, la revoluciulo

En la epoko de la dua respubliko kaj de la civila milito la nova Hispana Esperanto-Asocio (HEA) estis la reprezentanta instanco de la hispana esperantistaro. Ĝia nedisputebla gvidanto estis Mangada, framasono kaj kontraŭfaŝista radikalulo. Liaj armejunuloj alnomis lin “popola generalo”, la registaro agnoskis nur la rangon de kolonelo. Laŭdire liaj malamikoj nomis lin “la ruĝa diablo”.



Dum la 11a Hispana Kongreso de Esperanto en Barcelono revenis al la prezidanteco de HEA Julio Mangada, kiu senĉese kontrolis la asocion. HEA okazigis multnombrajn propagandajn taskojn en oficialaj instancoj kaj atingis gravajn sukcesojn. Cetere en multaj internaciaj kunvenoj Mangada kaj aliaj HEA-anoj reprezentis la registaron. Tamen, en hispanaj medioj lige kun lia persono la historiografio ignoris, eĉ minimumigis la gravecon de Mangada en la historio de la respubliko kaj de la intercivitana milito. Tiu traktado ne kongruas kun la “portretoj”, kiujn faris de li samtempuloj kiel Madariaga, Zugazagoitia, Cordón kaj Azaña.

Retiriĝinte el la hispana armeo, kiam parto de la armeo ekribelis, li



organizis miliciojn. Li havis kelkajn partajn sukcesojn, kiuj donis al li subitan eksterordinaran famon kaj eĉ eksterlande lia nomo disvastiĝis inter la esperantistaro, por kiu Mangada iĝis la simbolo de la kontraŭfaŝisma rezistado.

Tamen, post tiuj gloraj eventoj, lia kolono (grupo militista) klopodis malebligi la avancon de la frankistaj trupoj. Bedaŭrinde la kolono malsukcesis en Talavera, strategie grava urbo por trapuŝi sin al Madrido. Ĝi estis venkita kaj tio estis la fino de lia kariero kiel batalanto. Tamen, lia kolono estis ekzemplo por illustri la manieron batali en la respublikana flanko je la komenco de la milito, do dum la “milica” fazo de la milito.

Kiel multaj aliaj “brigadanoj”, Mangada devis ekziliĝi, unue al la nordo de Afriko, poste kun sia edzino kaj filo Luis al Meksiko, kie li mortis ĝuste la 14an de aprilo 1946, la “Tagon de la Respubliko”.



Mangada en sia studejo. Historie verfidele kolorigita fotoĵo



## C. Mangada la fervora esperantisto



Julio estis konata pro sia rolo en la hispana Esperanto-movado, ĉefe en la kampoj de organizado, propagando kaj eĉ literaturo.

Li lernis Esperanton kaj esperantistiĝis en 1906. Lia Esperanto-instruisto en militista rondo estis José Perogordo. Rimarkeble estas, ke la hispana Esperanto-movado tiam abundis je militistoj. Julio kunlaboris kun la presisto Emilio González Linera kaj la sammilitisto Fernando Redondo. En la framasona revuo “Hispana lumo” ili en 1907 publikigis artikolojn pri Esperanto. Sekve ili fondis jam esperantan periodaĵon “Homaro” (1912). Tiel ili defendis la ideojn de la zamenhofa homaranismo, influate de la ideoj de la framasonismo. Krome ili eldonis preskaŭ senpagan libron de Zamenhof kun la titolo “Homaranismo”.

En 1917 Mangada instigis al la fondo de “Federacio Zamenhof”, por krei tutlandan asocion. “Hispana Esperanto-Asocio” (HEA) fondiĝis en 1923. Mangada, kiel motoro de la movado, okupis plurajn postenojn. Ĉefe li redaktis la oficialan revuon, eldonadis ktp. Li estis tiel aktiva, ke li eĉ sukcesis varbi diversajn hispanajn altrangulojn.

Li ankaŭ verkis kaj eldonis gramatikan lernolibron por hispanlingvanoj kaj mem instruis, i.a. en la “Literatura Ateneo de Madrido”.




Kiel verkisto li kreis originalajn teatraĵojn kaj poemojn. Li tradukis i.a. la komencon de la “Kihoto” (Don Kihoto de la Manĉa) kaj du novelojn de Cervantes, en libro kun la titolo: “Du junaj fraŭlinoj” kaj “Korneliino”.



En la hispana li verkis la pamfleton “El fascio en el ejército” (“La fasko en la armeo”), historian verkon “Con quién” (“Kun kiu”) kaj regularon de hispana kartludo...Tamen ege kruele taksis Fernando de Diego en “La esperanta tradukarto” lian verkaron kiel ekzemplon de malbona stilo.

Post sia ekziliĝo al Meksiko, li denove verkis kaj pretis kunlabori en la reviziado de “Plena Ilustrita Vortaro”. Sed lia forpaso malhelpis al li kontribui al tiu projekto.



Bibliografio: José Antonio del Barrio: “Biografio de Julio Mangada”

Originala verkaro de Mangada:

- *Ferdinando VIa kaj Farinelli* (historia romano, 1920)
- *Helpanta temaro por ĉiuj landoj* (kurso de Esperanto, 1925)
- *Avvila* (1925)
- *Pri Hispanujo kaj ĝiaj popolkantoj*
- *Versaĵaro* (poemoj, 1922)
- *El moderna hispana Parnaso* (antologio de poemoj, 1927) *Cervantes: Du junaj fraŭlinoj kaj Korneliino* (traduko de du noveloj de Miguel de Cervantes el *Novelas ejemplares*, 1927)
- *Amelia kaj Marina* (poemoj, 1934)

*La redakcio de ENA tute dankas s-ron Del Barrio pro lia helpo haviginte multajn interesajn informojn.*

# NUMISMATIKA FORUMO

## Kriptomono Esperanto

Christian Kameir



### La evoluo de moneroj kaj mono

En sia fundamenta libro, “Mono kaj la Interŝanĝa Mekanismo”, la angla ekonomikisto William Stanley Jevons klarigas, ke valutoj traktas fundamentan ekonomian problemon: la duoblan koincidon de bezonoj. La frazo priskribas la enigmon enecan en interŝanĝo, kie la partioj de la transakcio devas konsenti vendi kaj aĉeti reciproke varojn. La evidenta defio estas la neverŝajneco de la bezonoj, bezonoj kaj eventoj, kiuj ebligus tian transakcion okazi samtempe kaj samloke. Manke de ĉi tiu duobla koincido de bezonoj, la partioj devas decidi pri akceptebla anstataŭaĵo: la interŝanĝa rimedo. Dum Jevon inkluzivis ĉi-lastan elementon en sian difinon de mono, lia pensado estis necese informita de kaj limigita al la teknologioj de liaj tagoj. Sekvas revizio de la difino de mono, la stato de valutoj kaj ilia ebla trajektorio kun konsidero al nunaj teknologioj, inkluzive de tiel nomataj "kriptovalutoj".

### Valuto kaj mono

Dum la ofte uzataj samsignifaj mono kaj valuto havas tre malsamajn signifojn: valutoj estas sistemoj de mono. Ĉi lasta ofte ankoraŭ estas difinita kiel interŝanĝilo, unuo de konto, normo kaj valoro, referencante difinon establitan de Jevons en 1876. Konsiderante, ke Graham Bell ricevis patenton por la telefono ĉirkaŭ la sama tempo, kaj ke tiu de Jevons ne povus inkludi ciferecajn interŝanĝajn formojn, ŝajnas taŭge retaksi la utilecon de la difino de mono, por solvi la koincidon de problemoj pri bezonoj.

## Interŝanĝo

Interŝanĝaj rimedoj historie alprenis multajn malsamajn formojn kaj ankoraŭ faras ĝin ĝis nun. Depende de la tempo kaj loko, oraj moneroj, ŝtonoj kaj konkoj estis uzataj kiel mono. Krudvaroj kiel ekzemple oraj kaj arĝentaj moneroj estis sekvitaj per krudvar-apogataj bildaĵoj – kutime paperaj atestiloj – interŝanĝeblaj kontraŭ specifaj kvantoj da agnoskita metalo. Ĉi tiuj teknologioj komune havas, ke la simpla translokigo de la instrumento de aĉetanto al vendisto kombinas la pagon kaj pagadon de transakcio; ili estas *portiloj*.

Hodiaŭ, la interŝanĝa rimedo plej ofte esprimiĝas per la manipulado de ciferecaj enskriboj de kontaj libroj esprimitaj per fidinda mono. Ĉi lasta kvalito rilatas al la ĉesigo de krudvar-subteno de registaroj fare de registaroj nevolaj aŭ nekapablaj aranĝi elstarajn krudvar-devontigojn. Anstataŭe leĝdonantoj kreis leĝajn pagajn leĝojn, kiuj starigas iujn instrumentojn kiel monon. Ĉar la kontoj de aĉetantoj kaj vendistoj plej ofte estas tenataj de diversaj financaj institucioj, ĉi tiuj nepre devas kunlabori por ĝisdatigi la ciferecajn librojn de la partioj por reflekti la interŝanĝon de mono.

Depende de la koncernaj bankoj kaj teknologioj, la procezo por ĝustigi ĉi tiujn distribuitajn librojn povas daŭri inter 24 horoj, tagoj aŭ eĉ semajnoj por translima transakcio. Ĝis lastatempe, konsumantoj postulantaj portantajn instrumentojn por interkonsentaj transakcioj kun tuja kompromiso, plejparte limiĝis al IOU-oj presitaj kiel monbiletoj, ofte nomataj "kontantmono".

## Elektronika mono

En 2008 artikolo, publikigita sub la pseŭdonimo Satoshi Nakamoto, enkondukis la koncepton de interkonsenta elektronika kontanta sistemo nomata "Bitcoin". Kiel la papero klarigas, enskriboj en la ĉeflibro de Bitcoin estas protektitaj kontraŭ manipulado per kripta skemo, kiu kalkulas transakciojn en tempaj stampitaj intervaloj en blokojn. Ĉi tiu funkcio inspiris la esprimon "blokĉeno" por priskribi malcentran libron kaj "kripta monero" – "kripto", mallonge - por la nomado de enskriboj en tia libro – sufiĉe bedaŭrinda termino, kiu kaŭzis multan konfuzon inter programistoj kaj reguligistoj.

Simile al la arkitekturo de Interreto, blokĉeno ne dependas de unu ento aŭ konsorcio; eniroj en blokĉenoj povas esti kreitaj de iu ajn mastrumanta la programon. Kompleksa kombinaĵo de ĉifrado kaj ludmekaniko certigas, ke transakciojn faritajn per blokĉeno estas preskaŭ neeble ŝanĝi. Ĉi tiu lasta kvalito – ankaŭ ĉe la aliaj blokokatenaj denaskaj havaĵoj, kiel la etero de Ethereum – faris la bitmonon la unua iam ajn *cifereca portila instrumento*.

Daŭrigota



# TERMINARO

## Alfabeto Listo (27)

**aĝio:** aŭkciaj aldonaj kostoj – kutime kiel elcento de la prezo – ŝuldataj por aĉetita objekto.

**bilono:** malaltvalora arĝento aŭ kupro-alojo kun nikelo aŭ zinko, kiu aspektas kiel arĝentaĵo.

**brakteato:** el la latina “bractea” (= maldika metala monero). Komence moneroj pregitaj per spegulbilda stampilo en ege maldikan metalan disketon. La verso estas konkava, la averso reliefa. La objekto estas pregitata reverse aversen.

**bronzopatino:** kemia reago de kupra klorido (CuCl), rekonebla pro malhelverda ĝis bluverda pulvorea tavolo sur bronzaj moneroj kaj medaloj.

**galvanizi:** surkovri ion per maldika tavolo de metalo helpe de elektroliza kontinua kurento.

**investa medalo:** medalo stampita okaze de solena enoficigo.

**kriza monero:** monero farita post la origina stampado kaj eldonado, ofte kun bone rimarkeblaj diferencoj.

**memoriga medalo:** medalo stampita okaze de speciala evento aŭ kiel memoraĵo por persono.

**ori:** maldika tavolo de oro estas metata sur la baza materialo (kutime arĝento aŭ kupro) ĉu per kemia substanco aŭ per galvanizado.

**pagmedalo:** medalo kun ne-oficiala pagvaloro, kiu aspektas kiel monero. Uzita ekz. de esperantistoj, kiel la spesmilaj kaj stelaj pagmedaloj.

**poststampo:** vidu ankaŭ en ĉi listo: “kriza monero” kaj “surstampado”.

**pramono:** konkoj, ŝtonetoj, uzobjektoj, juveloj ktp uzitaj kiel intersanĝiloj en la prahistorio.

**rulpremi:** rulpremita oro estas la rezulto de jena procezo: arĝento aŭ ne-nobla metalo (kiel kupro aŭ latuno) estas fandata inter du maldikaj oraj platoj. Per varmigado la tuto sekve estas fikspremata por uzado sur medaloj aŭ juveloj.

**stampilfendo:** hazarda fendo en la stampilo, videbla poste sur monero kiel maldika reliefa ŝnureto.

**standardo:** flago.

**surstampado:** reuzo de ekzistanta monero per stampado sur ĝi de nova bildo.

**zinkopesto:** blank-grizaj oksidaj makuletoj sur zinkaj moneroj.

## René de Saussure, der „Erfinder des universellen Geldes“

### Stelo-Münzmedaille zur 150. Wiederkehr seines Geburtstages

René de Saussure wurde am 17. März 1868 in Genf geboren. Nach dem Studium der Sprachwissenschaft und Mathematik verfasste er sein wichtigstes Werk „Über die Wortbildung im Esperanto“. Sein Bruder Ferdinand de Saussure war der Begründer der modernen Linguistik.

1907 publizierte René de Saussure das Projekt einer universellen Währung, die er „Spernilo“ nannte. Aus dem französischen Wort „espérer“ leitete er „espero“ ab. Mil bedeutet 1000. Man unterschied Spernilo (Sen), spercento (Sc) und sperdekilo (Sd). Diese Währung wurde offiziell von einigen britischen und Schweizer Banken verwendet. Außerdem wurde die Cekbanko Esperantista gegründet.

Der Spernilo hatte den Wert von 0,733g reinem Gold und konnte wegen der Goldbindung leicht in andere Währungen umgerechnet werden: 1 Sen = 2 Britische Schillinge = 1 Russischer Rubel = 0,5 US-Dollars = 2,5 Schweizer oder Französische Franken = 2,5 Spanische Peseten.

1942 wurde in den Niederlanden die Universala Ligo gegründet. Diese Organisation trat für die internationale Verständigung und eine universelle Währung ein. Der Name dieser Währung ist der Stelo (Stern; Mehrzahl Steloj). 1959 wurden Münz-Medallien zu 1, 5 und 10 Steloj geprägt. 1965 folgten drei Varianten einer 25-Steloj-Münze. Auch Papiergeld wurde herausgegeben.

Die Steloj eigneten sich sehr gut vor allem für die Überweisung von kleineren Beträgen im internationalen Zahlungsverkehr. Auch diese Münzen und Geldscheine wurden eifrig gesammelt und sind heute sehr gesucht.

2012 gründete Albert Boon in Belgien die Esperanto-Numismatika Asocio. Die Mitgliedschaft ist kostenfrei und kann bei [bert.boon@klynex.be](mailto:bert.boon@klynex.be) beantragt werden. Mitglieder erhalten viermal jährlich kostenfrei die Zeitschrift „Esperanta Numismatika“.

Im November 2017 erschien erstmals eine Steloj-Münzmedaille in Feinsilber, Nominal 100 Steloj, geprägt von der Münze Österreich AG.



Die Münzen zu 1 Sm und besonders jene zu 2 Sm waren und sind bis heute begehrte Sammelobjekte und verschwanden daher schnell aus der Zirkulation. Foto: Wikipedia



10 Steloj 1959, weitverbreitetes Zahlungsmittel innerhalb der Esperanto-Gesellschaften, geprägt in der Rijksmunt Utrecht auf Veranlassung der Esperanto-Ligo. Foto: Münzen & Medaillen Deutschland GmbH, Auktions 18 (22. März 2012), Nr. 109, Schätzwert 30 Euro, Zuschlagspreis 85 Euro



Im November 2017 erschien erstmals eine Steloj-Münzmedaille in Feinsilber, Nominal 100 Steloj, Masse 1 Unze Feinsilber (31,1 g), Preis 55 € inklusive Zustellung. Geprägt von der Münze Österreich AG. Bestellungen: [esperanto@schalls.at](mailto:esperanto@schalls.at)

**AURUM-PROOF X**  
EDELMETALL-PRÜFGERÄTE

Schützen Sie sich vor Edelmetall-Fälschungen durch innovative Prüfgeräte:

- X MAGNETPENDEL
- X MAGNETWAAGE
- X DICHTBESTIMMUNG

► [www.aurum-proofx.de](http://www.aurum-proofx.de)

**Münzen Zentrum**  
Olge. Kfm., Handels GmbH & Co. KG

Auenpergstraße 5, A-1080 Wien • Tel.: +43 (1) 406000  
office@muenzenzentrum.com • [www.muenzenzentrum.com](http://www.muenzenzentrum.com)

Umfassendes Sortiment aus aller Welt • Bequemes Online-Shopping  
Abo-Service • Neuauflagepreise der Münze Österreich  
Kostenlose Sortimentkataloge (Länder, Motive ...) • Ankauf und Verkauf  
Öffnungszeiten: Montag bis Donnerstag, 9:00-17:00

La redakcio de EN kore dankas Walter Klag pro la sendo de la artikolo.

# **REPOŝTO**

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

23.06.2021 19:32

*Kara amiko Jozefo!*

*Pli frue ol kutime mi jam ekkaptas la frapilon de via virtuala pordo. Pardonon!*

*Kaŭzo estas la alproksimiĝo de la someraj ferioj. Mi celas sendi la revuon antaŭ ol la eventualaj legantoj estus veturontaj al iu paradizo sen "sina" komputilo...*

*Mi do afable petas vin kontroli la antaŭlastan numeron de 2021.*

*Vi jam klarigis al mi kial vi devas resti en via lando. Tamen mi deziras al vi kaj al viaj gekaruloj agrablajn somerajn monatojn kaj krome interesajn okupojn por vi mem.*

*Tutkore mi antaŭdankas vin pro via necesa provlegado kaj mi salutas vin amike kaj numismate,*

*Bert*

26.06.2021 10:08

Kara Bert,

kun ioma malfruo ol intencite mi sendas per WeTransfer la kontrollegaĵon. Pro familiaj kaŭzoj mi devis nome por tempo forveturi.

En jk. 8 n-ro 2 mi ĝoje vidis belan ĉeĥoslovakon memormedalon pri la monfarejo en Kremnica (hungare: Kőrmöcbánya). Ĝi estis tra jarcentoj la reĝa monfarejo de Hungario, kiel atestas prie la hungara blazono sur ĝi.

Mi deziras al vi kaj viaj familianoj agrablan, senvirusan somerumadon!

Amike: Jozefo



7.06.2021 9:39

*Estimata Sinjoro Prezidanto,*

*En la nomo de Esperanto-Numismatika Asocio(ENA) mi gratulas kaj bondeziras la iniciatantojn de via grava evento. Tiel ili daŭrigas la tradicion de la famegaj "FLORAJ LUDOJ".*

*Bedaŭrinde mankas -mi supozas - eldono de memoriga medalo okaze de tiu eksterordinara evento. Por stimuli niajn ĉinajn samideanojn ni kunsendas informilon pri esperanta numismatiko, la scienco pri moneroj kaj medaloj.*

*Bonvulu dissendi en via lando tiun artikolon.*

*Mi kore antaŭdankas kaj deziras grandan sukceson!*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Fil. Bert Boon  
Iniciatinto de ENA  
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"  
Fakdelegito de UEA por Belgio*

19.06.2021 10:02

Estimata s-ro Berto Boon,

Koran dankon pro via gratulo.

Amike

Wu Guojiang

19.06.2021 12:15

*Estimata S-ro Wu,*

*Tute ne dankinde!*

*Se iu klubo aŭ asocio en via lando celus iam eldoni esperantan medalon, ĝi rajtas peti senkoston helpon de ENA. Ni havas liston kun informoj kaj konsiloj por fari la projekton sukcesan kaj **antaŭmendon por minimume kvar medaloj.***

*Altestime kaj numismate,*

*Bert Boon por ENA*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.07.2021 12:06

*Dankon, Bert! Kia mondo respeguliĝas en medaloj!*

*amike*

*Renato Corsetti*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆



07.07.2021 12:41

Saluton!  
Dankon por la revuo,  
mi jam dissendis ĝin.  
Amike,  
Maria Niemyjska  
Esperanto-Libraro Bjalistoko

07.07.2021 20:49

*Saluton, Maria!*  
*Multan dankon pro via iniciativo dissendi la revuon. Kiom da personoj tiel ĝin ricevas?*  
*Amike kaj numismate,*  
*Bert*

09.07.2021 10:56

Saluton!  
Mi dissendas la revuon al personoj, kiuj estas ligitaj kun Esperanto en Bjalistoko kaj en podlaĥia reĝiono, ankaŭ estas kelkaj esperantistoj de Pollando. Tie estas 82 retadresoj.  
Mi estas la nova bibliotekistino en Esperanto-Libraro (Ela Karczewska emeritiĝis). **Se vi permesas, mi farus reklamon de nia konkurso: Literatura Konkurso 2021 „Esperanto ligas homojn” por rakonto sub la titolo „Kio estis, kio estos?”**  
<https://espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2021/>  
Se vi havus demandon, ne hezitu.  
Amike,  
Maria

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.07.2021 17:22

Kara Amiko!

Elkore ni dankas vin pro la aperigo de niaj informoj pri Bernie en via vere tre interesa kaj valora numismatika revuo!!! Ni deziras sukcesan daŭrigadon de via valora kaj interesa agado!

Sincerajn salutojn

Éva Golden kaj la filoj

07.07.2021 19:01

*Kara Sinjorino Golden!*

*Tute ne dankinde. Mi sincere dankas vin kaj viajn filojn. Se iu el vi deziras senkoste ricevi pliajn numerojn (4foje jare) bonvolu mencii la nomon.*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.07.2021 20:47

Kara amiko Bert,

Dankon pro plia numero! Mi jam vidas, ke artikolo solvas demandon, kiun mi havis pri patino...

Amike,

via amiko James

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.07.2021 0:58

Dag Bert

*Saluton Bert,*

Bedankt voor het mooie tijdschrift!

*Dankon pro la belega revuo!*

Indien je het zou wensen kan ik de nummers van ENA ook opnemen in Vikiflandrio bij de 'revuoj'.

*Se vi dezirus, mi povus aldoni la numerojn de ENA en Vikiflandrio en la rubriko "Revuoj".*

Met vriendelijke groeten

*Kun amikaj salutoj,*

Albert Claesen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.07.2021 18:28

Kara Bert,

multajn dankojn por la mesaĝo kun multegaj tre interesaj informoj. Certe mi utiligos ilin por mia laboro.

Amike Josef Kříž (Joĉjo Kruco), Ĉeĥio

08.07.2021 20:54

*Saluton Joĉjo!*

*Vi ĝojigas min per via afabla reago!*

*Unue mi estas kontenta, ke nia revuo entenas por vi interesajn informojn. Pli agrable ankoraŭ estas la mesaĝo, ke la revuo estas utila por via laboro. La kulmino estas, ke la mencio de la*

*revuo kaj de ENA rilate al via laboro estas sendube la plej taŭga kaj efika propagando por la unua numismatika fakgrupo en la historio de Esperanto.*

*Do, estas mi kiu danku vin! Tion mi nun faras tutkore!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



06.08.2021 23:02

Karaj geamikoj, gesamideanoj!

Ĝoje mi informas vin, ke aperis la plej freŝa numero de la Medicina Internacia Revuo (MIR), En la revuo inter aliaj legeblas la faka artikolo de s-ino *Katarina Faragó*: „Rilatoj inter tiroidaj malsantipoj kaj sterileco. Trarigardo de la fakliteraturo kaj personaj spertoj, rezultoj”. Jam pretiĝis la detala provizora programo de la venontjara 22-a IMEK. Ĝi okazos en urboj Hódmezővásárhely kaj Szeged.

Mi almetas la koloran kovrilon de MIR.

Mi petas vin, bonvolu disvastigi la supran informon inter viaj kuracistaj gekolegoj. Pri la aliĝoj, kotizoj ĝustatempe mi informos vin.

Kun kolegaj salutoj:

D-ro Imre Ferenczy  
honora prezidanto de UMEA

07.08.2021 9:55

*Kara samideano!*

*Dankon pro viaj informoj, kiujn mi disvastigos en la oktobra numero de “Esperanta Numismatiko”. Tiurilate mi havas demandon: ĉu okaze de la 22-a IMEK aperos nova medalo?*

*Amike kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*  
Iniciatinto de ENA



07.08.2021 15:42

Kara samideano Bert Boon!

Koran dankon al vi pro la disvastigo de la 22-a IMEK. Mi sendas la kopion al s-ino Katarina Farago, ŝi estas la ĉeforganizanto. La eldono de medalo certe dependas de la financaj eblecoj.

Kun koraj salutoj:

Imre Ferenczy



19.08.2021 14:48

*Saluton kara amiko Garry!*

*Kiel vi fartas? Ĉu la pandemio maltrafis ankaŭ vin kaj viajn gekarulojn en Kanado? Mi esperas, ke jes.*

*Ĉu novaĵoj pri la venonta UK en Montrealo?*

*Kun amikoj salutoj,*

*Bert*

23.08.2021 14:26

Saluton Bert,

Dankon pro via mesaĝo. Ni Esperantistoj ĉiuj fartas bone en Montrealo: la vivo iom post iom revenas al la normaleco, kvankam eskterlandaj vojaĝoj estas ankoraŭ malfacilaj. Kiel pri vi en Belgio?

La Montreala LKK daŭre laboras diligente por la venontjara UK. Certe la plano estas okazigi ĉeestan kongreson kaj ni estas plenaj je espero ke tiu eblos. Mi kompreneble volos presigi medalon se la kongreso okazos, sed eble mi atendos ankoraŭ kelkajn monatojn antaŭ ol fari la finan decidon.

Amike,

Garry





*ANONCOJ*

&

*EVENTOJ*


D: 8.50 € - A: 8.90 € - CH: 10.90 Sfr - Ausgabe: Juli/August 2021 (7+8/2021) B 99118

MÜNZEN & SAMMELN Juli/August 2021

# MÜNZEN & SAMMELN

PAPIERGELD UND MEDAILLEN

**Aktuell**



**Neue Flußgold-Medaille aus Rheingold**


**Die besondere Medaille:**  
Die Befreiung Ostpreußens 1914/1915

**Deutsche Euro-Münzen:**  
Nachtrag zum Euro-Variantenkatalog – die 20-Cent-Münzen ab 2007, Teil 2

**Belagerungsmünzen:**  
Erste Belagerung Wiens durch die Türken


**BEWERTUNGEN:**

**43 Seiten:**  
Weimarer Republik, Drittes Reich, BRD, DDR, Euro-Münzen von Andorra bis Litauen, 2-Euro-Sondermünzen, deutsche Euro-Münzen



## SERAPIS

VOM HOCHVEREHRTEN GOTT  
ZUM DÄMON DER CHRISTENHEIT



4 199118 908509 05

## Neue Flußgold-Medaille aus Rheingold

Die 2018 initiierte Serie der Flußgoldprägungen fand beim Publikum guten Zuspruch. Den früheren Ausgaben im 1/4-Unzen-Gewicht folgten Stückelungen zu 1/2 Unze und mit dieser Prägung erstmals ein großformatiges Stück. Der bisherige und zukünftige Schwerpunkt der Motive wird bei der Behandlung der römischen Vergangenheit des Rheintals liegen. Da die Gewinnung des Rheingolds gewissermaßen vor Ort erfolgen konnte, überwog die Verwendung dieses heimischen Materials im Rahmen der Prägeserie. Bis Mitte 2021 entstanden daraus zehn unterschiedliche Ausgaben; die 1-Unze auf Kaiserzug als elfte.



Rheingold-Medaille im Unzen-Gewicht (31,1 g) von Victor Huster

Die Vorderseite zeigt eine große »1« als Wertziffer, dem Flußbett des Rheins vorgelagert, daneben das badische Wappen. Von oben her erfahren, durch das fließende Wasser ständig abwärts weitergeschobene, zuerst grobe, dann immer feiner werdende goldhaltige Gesteinsfragmente eine fortschreitende Abrasion. Die von dieser »1« radial ausgehenden drei Linien symbolisieren den Eingriff der Goldgewinnung: Das zufließende Material wird davon angehalten und separiert, um links der »1« als

mikroskopisch kleine Goldfitter, als Schwerkonzentrat, gewonnen werden zu können.

Dreizeiliger Text »2021 / Nativ 926 / (1) UNZE RHEINGOLD«. Die Auflage ist bezeichnet mit »30 EX«, Signatur »VICTOR / HUSTER« für Entwurf und Prägung, sowie für die Goldgewinnung »K+O / LÖSEL«, stehend für Kai Lösel und seinen Sohn Oliver. Die Rückseite untersucht die Ruine dieses größten römischen Theaters nördlich der Alpen, direkt am Rhein gelegen bei Kaiserzug, ehemals »AVGVSTA RAVRICA« und älteste römische Siedlung in der Schweiz. Der antike Ortsname der Mitte des ausgehenden 1. Jahrhundert v.u.Z. gegründeten Römersiedlung bezieht sich auf den vorher dort sesshaften keltischen Stamm der Rauriker. Mit der teilweisen Zerstörung des Ortes durch die Alamannen 273/274 setzte auch der Verfall des Theaters ein, stellenweise mißbraucht als Steinbruch, teilweise überdeckt durch hinzukommende Zivilisationschichten.

Dieses zeigt die Medaille als partielle Rekonstruktion der Anlage unter den linearen Grabungsabsteckungen der Archäologen: links sichtbar die intakte Anlage mit ihren Sitzreihen und dem Säulengang darüber, davor das Areal des Jupiter-Tempels, rechts die verborgenen überdeckenden Fundhorizonte über der Ruine. Im Zentrum tanzt eine Darstellerin, eine Maske haltend, als Hinweis darauf, daß es sich um ein szenisches Theater handelte, wie es auch die drei antiken Masken im oberen Bereich betonen.

Über der Signatur »VH« sind die Medaillen mittels kleinem Punzeinschlag einzeln nummeriert.

Das natürlich belassene Rheingold wurde zur Verprägung offen als Rohlinge geschmolzen und enthält eine Fülle originärer mineralischer und metallischer Beimengungen. Das Material ist somit spröde und entwickelt unter dem hohen Prägedruck auch manche Risse im Randbereich, vergleichbar der Gestalt antiker Münzen.

## Ein neuer Stelo

Der Stelo (dt. „Stem“; Plural: Steloj) wurde 1959 als Währungseinheit der Esperanto-Bewegung geschaffen. Das Ziel war die Etablierung einer einheitlichen Weltwährung. Vorläuferversuche, eine Währungseinheit, den Speso, einzuführen, wurden durch den Ersten Weltkrieg vereitelt. Für eine Zeit gab die Universal League (in Esperanto: Universala Ligo), der weltföderalistische Arm der Esperanto-Bewegung, Banknoten und Münzen in Steloj aus und machte Versuche, den Stelo auf der Basis der relativen Kaufkraft der verschiedenen Nationen an existierende Währungen anzulehnen. 2012 wurden Münzen (Jetons) in den Nominanzufen von 1, 3 und 10 Steloj aus Kunststoff geprägt. Die Auflage beträgt jeweils 3000. Sie werden derzeit bei mehreren Jugend-Esperantokongressen verwendet. Zur 150. Wiederkehr des Geburtstags von René de Saussure (1868–1943) erschien Ende 2017 eine Steloj-Münze (Medaille) erstmals in Feinsilber 999/1000 im Unzengewicht.



Nunmehr wurde ein 50-Steloj-Stück (30 g) in Sterlingsilber (Ag 925 fein) in einer Auflage von 300 PP-Exemplaren auf den 100. Jahrestag des 12. Esperanto-Kongresses von 1920 in Den Haag ausgegeben. Die Rückseite zeigt ein Kopfbild der niederländischen Esperantistin Julia Hebricker (1887–1971). Der Entwurf stammt von Walter Klag (Wien) und Helmut Andeslinger (Wien). Seine Initialen A.H. stehen rechts vom Hals des Kopfbilds. Geprägt wurde die Auflage in der Münze Wien.

En la revuo „Münzen & Sammeln“, julio –aŭgusto 2021, aperis sur paĝo 14 artikolo koncerne la novan 50-Steloj-pagmedalon.

Mag. Walter KLAG  
Journalist und Herausgeber - La Bulteneto  
Delegierter des Esperanto-Weltbundes  
Rudolfingergasse 8/11, 1190 Wien

## Aŭkcio de du serioj de Esperanto-Steloj

En Dorotheum, Vieno, Aŭstrio, kaj rete.

Ofertoj eblas jam nun, post ensaluto, ĝis la 24a de septembro 2021:

<https://www.dorotheum.com/de/1/7328461/>

<https://www.dorotheum.com/de/1/7328458/>



1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960 in Utrecht), AR 50 Steloj 2020 (Auflage 300 Stk.), AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017, Auflage 1000 Stk.), beide geprägt in Wien. Dabei Begleitheft zum Stelo Geld der Esperantogemeinschaft. I/PP

1, 5 kaj 10 Steloj 1959 (pregitaj 1960 en Utrecht; ne cirkulintaj);

arĝenta [925/1000] 50 Steloj 2020 (eldonkvanto nur 300),

arĝenta [999/1000] 100 Steloj 2018 (pregita 2017, eldonkvanto nur 1000), ambaŭ pregitaj en Vieno, Aŭstrio, en plasta ujo, surfaco PP (polurigita plato).

Unu serio = 5 pregaĵoj.

Aldonita germanlingva kajero kun la titolo “Stelo – la mono de la Esperanto-kunumono” kun kontribuajoj de geedzoj Klag, Bert Boon kaj aliaj.

Eksperto en Dorotheum: Dr. Norbert Helmwein

+43-1-515 60-424 [norbert.helmwein@dorotheum.at](mailto:norbert.helmwein@dorotheum.at)

Startprezo: EUR 130,-

La menciita kajero estas senpage en formato pdf, en la germana kaj en Esperanto, ricevebla ĉe: [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

Käufer Hotline Mo.-Fr.: 09.00 - 18.00

[kundendienst@dorotheum.at](mailto:kundendienst@dorotheum.at)

+43 1 515 60 200

Auktion: Münzen und Medaillen

Datum: 24.09.2021 - 16:18

Auktionsort: Abteilung für Briefmarken, Münzen und Orden

Besichtigung: ab 06.09.2021

## *Varbilo por ENA!*

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 148 individuaj membroj kaj 23 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

**Vi krome rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

[bert.boon@skyne.be](mailto:bert.boon@skyne.be)